# *La propono de palestina batalhalto estas en la manoj de perantoj*




**Foto: PL**

Havano, maj 8 (RHK) La vic-?enerala sekretario de la palestina islama ?ihado-movado, Mohammad al-Hindi, konfirmis, ke la propono de batalhalto ne malsukcesis kaj estas en la manoj de perantoj, raportis hodia? Al Mayadeen en Bejruto.

En deklaroj al la tut-araba multplatformo, Al-Hindi elstarigis la ekziston de nacia konsento pri interkonsento-dokumento aprobita de la mediaciistoj de Egiptio kaj Kataro, inkluzive de Usono.

La? la palestina gvidanto, la estro de la israela registaro, Benjamin Netanyahu, ne volas interkonsenton, ?ar tio signifus la finon de lia politika kariero.

Al-Hindi memorigis, ke la pozicio de la Rezisto estas klara en defendo de la interesoj de la palestina popolo kaj rimarkis, ke "tio estas anka? la pozicio de la mediaciistoj, kaj hodia? ili estas elprovitaj".

La ?enerala vicsekretario de la Islama ?ihado klarigis, ke la ?efa afero diskutenda en la interkonsento estas la batalhalto kaj la perantoj ofertis garantion, ke la "da?rigebla" punkto signifas konstantan ?esigon.

Pri la israela armea operacio en Rafah, sude de la Zono, li emfazis, ke tia sturmo de la Telaviva armeo konsistigas manovron, ?ar la batalhalta dokumento kondi?as kompletan retiri?on el Gazao.

Tiurilate li emfazis, ke la okupacia aventuro en Rafah renkontos reziston ?ie kaj palestinaj batalantoj provos grandajn perdojn al la vicoj de israelaj trupoj.

Por la ?enerala vicsekretario de Islama ?ihado, ?iuj militaj eblecoj por la okupado, sude de Gazao, ne havas horizonton kaj la israela retiri?o el Rafah estos nova signo de fiasko.
Israelo, pri kiu Okcidento parolis kiel demokrata ?tato, fini?is kaj aperis kiel ekstremisma nazia ento, diris Al-Hindi.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/354218-la-propono-de-palestina-batalhalto-estas-en-la-manoj-de-perantoj

**Radio Habana Cuba**